



monda solidareco

N-ro 116 - Februaro 2016 - kvaronjara - 1.25 €

Ni ŝanĝu la sistemon... !

Ĉu necesas atendi, ke 195 ŝtatestroj bonvolu akordiĝi por meti la rajtojn de la civitanoj kaj de la estontaj generacioj post la aferoj ? La individuoj, la asocioj ne restas kiel spektantoj. Ili alportas alternativojn.

Ni ŝanĝu la sistemon, ne la klimaton ! Tiu slogano aperis en 2015 dum la civitana forumo de LIMA (Peruo), margene de la « COP-20 » klimatkonferenco. Post unu jaro, ĝi estis reuzita en Eŭropo de « Alternatiba » kaj aliaj movadoj kaj organizaĵoj.

De nun oni konstatas ĉie kaj ĉiam, ke la inter-nacia sistemo fundamentita sur la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kadukiĝas. Necesas trovi alian farmanieron. Sed ĉu necesas atendi ke la solvo venu de supre ? aŭ demonstri, ke oni povas fari alimaniere ?

Ni lasu al la fakuloj la problemon kaj la analizojn. Je nia civitana vidpunkto, necesas ekiri de la solvoj, kiujn ni povas inventi kaj en kiuj ni povas patopreni. Tion oni nomas « alternativoj ». Tiuj konkretaj agadoj ampleksas ĉiujn kampojn de la vivo : transporto, loĝado, nutrado, edukado, sano, urbanizado, ktp..

Jen kelkaj ekzemploj tiritaj el la praktiko de Monda Solidareco kaj de asocioj, kiuj estas proksimaj al ĝi :

- ☞ Surloke stoki la grenojn por disvendi ilin sur la loka merkato laŭlonge de la jaro, estas aktiveco en kiu ĉiuj agantoj estas geografie proksimaj ; tio evitas la longegajn transportojn, tio respektas atmosferon kaj klimaton, kaj plie tio evitas la troojn de la spekulacio.
- ☞ Surloke fadenigi kotonon ; fari el ĝi teksaĵojn kaj vestaĵojn por sia klientaro, tio certe plibone respektas la medion ol labori por transnacia industrio kaj reaĉeti teksaĵojn aŭ vestaĵojn post transformado en Azio.
- ☞ Valorigi la lokan produktadon de fruktoj per la transformado en fruktosukojn ; krei senpagajn kaj amikecajn lokojn kiel la « Nenioma Butiko » en Mulhuzo ; ŝanĝi nian rilaton kun la manĝo por fari el ĝi momentojn de frateca kundivido kaj de respekto por la nutraĵo.

Ni civitanoj ja havas solvojn de solidareco je nia nivelo, kaj de niaj responsantoj ni povas atendi ke ili protektu kaj kuraĝigu tiun specon da iniciatoj.

Venas la momento kiam ekaperas nova aktiva generacio, kiu sin plene devontiĝas. Nun la atencoj kontraŭ la medio, la klimata ŝanĝiĝo, la kapablo de la loĝantaroj antaŭgardi sian socian interplekton kaj plibonigi sian prinutran memsufiĉon, estas mondaj aferoj, vivesencaj, urĝaj. Ili instigas firman sindevontigon, la necesecon de gajnantaj strategioj en rapida kalendaro. La elprovado ŝajnas montri al ni, ke tiu generacio estas ekaperanta.

Daniel Durand

Enhavo

| | |
|--|--------|
| <i>Ni ŝanĝu la sistemon. ... !</i> | p. 1 |
| Post la Atencoj (AMIP) | p. 2 |
| Ni ne timas ! | p. 3-4 |
| La Solidarecaj vojoj..... | p. 5 |
| El la Administra Konsilantaro | p. 6 |
| Kolofono..... | p.6 |



A.M.I.P.

Post la atencoj en Parizo ...

Ni, mondĉivitanoj, kunvenintaj en Asembleo la 22-an de novembro 2015 en Ungersheim (Francio), forte kortuŝitaj pro la atencoj plenumitaj en **Parizo** vendrede la 13-an de novembro, esprimas nian solidarecon kun la familioj, kiuj priploras forpason de unu el siaj anoj, kaj kun ĉiuj, kiuj estas vunditaj en sia korpo aŭ en siaj rilatuloj. Nia solidareco etendiĝas al ĉiuj viktimoj de similaj eventoj, kiuj okazis lastatempe en **Bruselo, Tunizo, Bejruto, Bamako** aŭ en la **sinaja** ĉielo kaj kiuj okazas ankoraŭ en multaj landoj kie la loĝantaroj estas submetitaj al teroro, eksproprietigo, malestimo.

Ni denuncas ĉiujn formojn de integrismo, kaj ĉiun perfortan agon kiu ajn ĝi estu, faritan kontraŭ personoj aŭ ties posedaĵoj.

Ni surpriziĝis per iuj reagoj en kiu temas nur pri milito, sekureco, urĝa stato, bombado, senrajtigo de ŝtataneco, " barbaroj ", " sango malpura [kiu] verŝiĝu en niajn sulkojn " .

Ni bedaŭras la mankon de paroloj pri la ekonomiaj interesoj kun iuj landoj pri nafto, armilvendoj, akvoregado, aŭ io alia.

Ni denuncas la ĝermojn de perforto, kiujn konsistigas la mizero de plej multaj apud la abundeco de malplimulto de la terloĝantoj, la atmosfera poluo, la akva poluo, la akaparo kaj la malŝparado de la fosiliaj energiaj rimedoj kaj de la raraj krudaj materialoj, la demografia eksplodo, la mona disordo.

Ni rememorigas la antaŭkonsiderojn de la universala deklaro de la homaj rajtoj, laŭ kiu : *" Pro tio, ke nepre necesas, por ke la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo "*

Ni deklaras ke paco kaj libereco estas fundamentaj rajtoj.

Ni admonas la bonvolajn virinojn kaj virojn el ĉiuj devenoj ekstari kaj agadi por ke la fundamentaj homaj rajtoj estu obeataj ĉie en la mondo, kaj ne cedi al la manovroj kaj provokoj de la pov-aparatoj, kiuj agas direkte al celoj kontraŭaj al iliaj interesoj.

Ni petas la politikistojn, la ŝtatestrojn kaj la registarestrojn konduki la strukturajn reformojn necesajn sur la socia kaj internacia plano por ke la loĝantaroj estu protektataj kaj defendataj en siaj rajtoj kaj liberecoj.

Pro manko de demokratiaj institucioj vere je la nivelo de la frontataj problemoj, ni invitas la diversajn koncernatajn partiojn renkontiĝi kaj privilegii dialogon, konduki pripensadon kaj konkretajn agojn kontraŭ la milito kaj por la paco, por kune serĉi pacajn solvojn al la konfliktaj situacioj, kiuj sen tio, riskas finiĝi per sinsekvo de katastrofoj, pri kiuj neniu povas antaŭpensi la konsekvencojn.

Ungersheim, la 22-an de novembro 2015

Tutmondista Informa kaj Gazeta Agentejo, institucio fondita de la Kongreso de la Popoloj
<http://www.recim.org/amip/abcd-eo.htm> - amip@citoyens-du-monde.org



« Ni ne timas »

Defendantoj de la rajtoj pri grundo, viktimoj pro sia kontraŭstaro al senbrida diskresko.

Ĉie en la mondo, la defendantoj de la rajtoj pri grundo frontas al kreskanta premo de la registaroj kaj ekonomiaj agantoj. Tiu premo kelkfoje kondukas al murdoj. La tuto okazas en kompleta indiferenteco kaj en kunteksto de ĝeneraligita senpuneco. Nun, pli ol iam ajn la defendantoj de la rajtoj pri grundo bezonas protekton. Ili bezonas nian apogon !

Rigobeita Menchú (Gvatemalo),
Nobelpremiito pri paco 1992

Tero kaj homoj sub premo

Nun, ĉio vendiĝas kaj ĉio aĉetiĝas ! La arbaroj, la montoj, la riveroj. Tiuj bienaj transakcioj alportas terurajn konsekvencojn sur la Tero. Sed la homo ofte estas la unua viktimo de tio ! Sur ĉiuj kontinentoj, virinoj kaj viroj vere batalas por ke ilia grundo, ilia identeco, ilia vivmaniero, ne estu neniigitaj. Kaj iuj pagas per sia vivo tiun engaĝiĝon. Ili ne kontraŭas ĉian diskreskon, sed apartan « nerespondecon », karakterizatan per krudaj decidoj, deciditaj de profitavidaj entreprenoj kaj de ofte koruptitaj registaroj.

Tiuj defendantoj de la rajtoj pri grundo plej ofte vivas en foraj regionoj, for de institucioj kaj amasinformiloj, kie oni povas plifacile aĉeti arbarojn, montojn kaj riverojn. Kaj nun, kiam la premo al grundo estas neeltenebla, la subpremo de ilia engaĝiĝo estas maksimuma. Minacoj, turmentadoj, arbitraj arestoj, agresoj, murdoj : la defendantoj de la rajtoj pri grundo estas la plej subpremataj defendantoj de la homaj rajtoj

Kio estas defendanto de la rajtoj pri grundo ?

Ĉiu persono aŭ aro de personoj, kiu agas por la promocio kaj protekto de la rajtoj rilataj al grundo. Povas temi pri gvidantoj aŭ membroj de komunaĵo, pri advokatoj, pri ĵurnalistoj, aŭ ankaŭ pri NROj.


Personoj, kiuj ĝenas

La defendantoj de rajtoj pri grundo estas plej ofte anoj de kampara komunumo rekte koncernataj per projekto pri ekspluato de agroj. Ilia batalo estas do vitala. Ili aktiviĝas por ne esti truditaj forlasi teritorion sur kiu baziĝas ilia ekzisto kaj ilia vivmaniero, aŭ se la deiro estas neevitebla, por ricevi kompensojn ŝulditajn al ili kaj esti reloĝigitaj laŭ dignaj kondiĉoj.

Por la aŭtoktonaj popoloj, tiuj situacioj estas teruraj ĉar il havas proprajn kaj kulturajn ligilojn aparte fortajn kun siaj praaj grundoj.

En tiu paca batalo, la defendantoj de la rajtoj pri grundo rememorigas la devigon por la ŝtatoj obei la juron, kaj aparte la rajton pri nutrado, akvo, la rajton pri sufiĉa vivnivelo, la rajtojn de la aŭtoktonaj popoloj, ktp. Tiu aktiva laboro povas havi diversajn formojn, laŭ la ŝtupoj. Komence, antaŭ la evoluigo de iu ajn projekto konsiderata kiel malobeo al la juro, la defendantoj informas, avertas kaj provas konviki la aŭtoritatojn ekmovi sur la traktada vojo.

Se ilia voĉo ne estas aŭskultita, se iliaj timoj ne estas konsideritaj, la defendantoj tiam organizas manifestaciojn, por postuli siajn rajtojn kaj atentigi la internacian komunumon. Manifestacioj, kiuj povas esti kelkfoje perforte subpremitaj.



Ĉar plej ofte, la ŝtatoj kaj la ekspluatantoj timas nur ke la projektoj estu bremsitaj aŭ eĉ haltigitaj, kondukante tiel al financaj perdoj por la entreprenoj kaj ŝtatoj. Iuj agantoj tiam konsideras ke ĉiuj rimedoj estas permesitaj por eviti tion, inkluzive uzo de perforto.

Engaĝiĝo perforte subpremita



La soleco de la defendantoj de la rajtoj pri grundo, kiuj ofte loĝas en malproksimaj regionoj, for de influaj agantoj, faciligas perfortajn agojn kontraŭ ili. Perforto same alta kiel la esperataj faraonaj monprofitoj, kiuj laŭ la lastaj jaroj tragike ampleksiĝis. Krom perforto, ankaŭ jura turmentado kaj de arbitra deteno estas uzataj de multaj ŝtatoj por timigi la defendantojn. Per liberecicidaj leĝoj, ŝtatoj malliberigas ĉiujn personojn, kiujn ili taksas ĝenaj. « Mensoga propagando », « trafo al ŝtata sekureco », « perturboj al la publika ordo », la superrajtaj akuzoj ne mankas kaj povas konduki al pezaj prizonpunoj.

Justico malfacile alirebla

Fronte al la fizikaj atakoj kaj al la arbitraj arestoj, la defendantoj de la rajtoj pri grundo ofte fariĝas senpovaj. La justicaj organoj de la landoj en kiuj okazas tiuj malobeoj, plej ofte mankas je sendependeco, rimedoj kaj sperto. Malmultaj enketoj tie estas deciditaj kaj ege malofte la agresintoj estas procesataj. Kaj tio des pli ke kelkfoje la ŝtatoj mem estas je la origino de tiuj atakoj.

Ekzistas regionaj kaj internaciaj mekanismoj por la protekto de la defendantoj de la homaj rajtoj, kiuj intervenas kiam la naciaj justicoj misfunkcias (specialaj proceduroj de UNO, organoj por kontrolo de la traktatoj pri protekto de la homaj rajtoj, kortumoj kaj regionaj komisionoj pri protekto de la homaj rajtoj). Plej multaj el tiuj mekanismoj ne jure trudiĝas sed ebligas alarmi la ŝtatojn kaj la internacian komunumon pri la situacio de endanĝera defendanto.

Kiam temas pri procesado de la entreprenoj, kiuj estus kulpaj pri malobeoj al la homaj rajtoj, la jura batalo – kiam ĝi eblas – estas ofte longa, riska kaj multekosta. La entreprenoj havas homajn kaj financajn rimedojn, kontraŭ kiuj malfacile eblas rivali.

Inversi la tendencon, tio eblas !

La ŝtatoj, la ekonomiaj agantoj kaj la internacia komunumo devas antaŭ ĉio sin doni la rimedojn por antaŭeviti la bienajn konfliktojn kaj la malobeojn al la homaj rajtoj. La ŝtatoj havas devigojn pri protekto de la rajtodefendantoj, kaj devojn pri informado kaj interkonsiliĝo de la loĝantaroj koncernataj per ekspluataj projektoj, al kiuj ili ne povas eskapi, kaj kiuj devas nun esti plifortigitaj. **Ĉar la manko de dialogo kaj de antaŭa, libera kaj klara konsento estas ambaŭ konfliktokreaĵoj, kelkfoje gravaj kaj mortigaj.**

Tio validas ankaŭ por la entreprenoj, kiuj ĉiam devas kaj laŭlonge de la laboroj, certiĝi ke ili obeas la homajn rajtojn.

Por tio, ili devas adopti disponojn pri prudenta diligenteco kaj certiĝi pri la efektiva partopreno de la koncernataj loĝantaroj, aparte per konduko de efektostudoj pri la homaj rajtoj kaj la medio antaŭ iu ajn projekto.

Krom antaŭevito, ankaŭ necesas plifortigi la kapablojn kaj la sendependecon de la naciaj justicaj sistemoj por ebligi al la defendantoj sinturnon al justico kaj gajni riparon kaze de malobeoj al siaj rajtoj. La plifortigo de

la regionaj kaj internaciaj mekanismoj pri homaj rajtoj estas ankaŭ ĉefa por protekti la agadon de la defendantoj. **Necesas ankaŭ plifortigi la internacian juron, por vere ebligi procesadon pri la respondeco de la entreprenoj, kiam ili malobeas la homajn rajtojn.**



La vojoj de la solidareco

... pasas tra Burkinio

La realigo de la projektoj tiaj kia tiu de la grentenejo de AFDES kaj Gnongondeme en Bobodiulaso estas favora ne nur al tiuj ambaŭ inaj grupoj.

Por konsistigi siajn stokojn la membrinoj iras en la vilaĝojn per motorciklo por aĉeti grenojn (milio, maizo, sezamo, sorgo,) de la malgravaj produktantoj. Por veturigi ilin ĝis la urbo, ili pagas transportiston.

Tiel la instalo de projekto de iu grupo havas efikon sur la loĝantaron, ĉu kamparan, ĉu urban. Ĝi helpas la vilaĝanojn komercigi sian produktadon de grenoj, ĝi kontribuas en la provizado de urbaj konsumantoj per lokaj produktoj.

Tiu formo de solidareco ebligas ĉiun digne vivi per siaj gajnoj kaj tiamaniere partoprenas en la malpliigo de la mizero.

... pasas tra Bakongo (Kongio)

Pastro Hippolyte Muaka, prezidanto de FOMARC (Hejmo Maria Reĝino de la Koroj) en Boma informis nin pri la gravaj malfacilaĵoj okazintaj pro misvetero (MSM partoprenis en la financado de porkejo kaj de legomkultivejo). Li skribis jene :

« Maltrankvilo estas, ke la klimataj ŝanĝiĝoj vere rimarkiĝas tie ĉi. Tre varmas. Multe pluvos. Okazas multaj inundoj kun multe da konsekvencoj : disfalintaj domoj, perdoj de homaj kaj bestaj vivoj, ktp..

Koncernante nian projekton, nia porkejo forfluis kompreneble ankaŭ la porkoj. Nun ni pripensas kiamaniere rekomenci la konstruadon de tiu porkejo. Feliĉe pri la legomkultivado, dum la seka sezono ni rekomencos kulturi, ekde majo. »

Prokrasto de la repago de la unua parto estas en la tagordo de la venonta kunsido de la Administra Konsilantaro.



... pasas tra Togolando - Sokodeo

La lasta bulteno raportis pri la misio farita fine de julio 2015 en Sokodeo de Symphorien Méda kaj John Agbeli, kaj pri la balotelekto de provizora estraro de la loka asocio prezidata de S-ro Donko Massimaye. Poste tiu estraro tre serioze eklaboris kaj aranĝis renkontojn kaj vizitojn ĉe la grupoj membroj de MSM.

La nova estraro pretigas la Ĝeneralan Asembleon planitan por marto 2016.

En sia dokumento, Donko Massimayele raportas pri aktivaj grupoj, sed ankaŭ pri malfacilaĵoj ŝulditaj al la hazardoj de la vivo. Li elvokas ankaŭ la deziron de la Globidaranoj partopreni en la renaskiĝo de MSM en la regiono.



Interna funkciado

Poŝta Banko : MSM informiĝu pri la kondiĉoj de konvencio « Adispo » kun la Poŝta Banko.

Diversaj konfliktoj pri APGA. La Administra Konsilantaro pripensas ekrilati kun la Konsulo de Francio en Lomeo kaj la procesa MSM-servo estos aktivigita kontraŭ la nefidindaj grupoj..

Edwige Géniteau taskas al si la dosierojn el Benino pluzorgitaj de Danièle Charier.

Projektoj

En Burkino, la grupoj AFDES, Gnongondeme kaj Wakogdo ricevis siajn financadojn kaj du grupoj petas sian membriĝon.

En Norda Kivuto (Kongio) ina grupo petas membriĝi.

En Sokodeo (Togolando), raporto de misio estis sendita de S-ro. Massimaye.

En Kenjo, la solidareca kontrakto kun la grupo Tumaini estas subskribita. La financado tujas.

En Senegalio, la repago de la lasta monsumo ŝuldita de la Bestkuracaj Helpantoj estas anoncita.

Kontakto.

S-ino Yasmina Sahraoui proponas siajn desegnojn kaj pentraĵojn al MSM pour eldoni poŝtajn kartojn kaj kalendarojn.

La estonta kunsido de la Administra Konsilantaro okazos en Niort (Francio, 79) la 12an kaj 13an de marto 2016.

monda solidareco estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

JE VIA DISPONO :

- Aliĝiloj
 - Flugfolioj pri projektoj
 - Pliajn bultenojn
 - Federacia Reglmento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
 - Afiŝetoj (A3-formato)
- Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

Nur por Eŭropo :

- Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikoĉemizoj 15 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».
- Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

Se vi konstatas malfruigon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.

KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

- ↳ per franca ĉeko al **Globidar**
- ↳ per poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
SMF- MONDA SOLIDARECO
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)
RIP:
FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056
- ↳ per banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo www.globidar.org
- ↳ ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.
- ↳ UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

| | |
|---------------|---------|
| Novembro 2015 | 1 132 € |
| Decembro 2015 | 3 388 € |
| Januaro 2016 | 894 € |

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

Jara abono : 5 €

Redakcia komitato : Claudine Tournier, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, John De La Cruz, Edwige Géniteau, Christian Trianneau
Fotoj el la fototeko de MSM
Emblemo : Yamsina Sahraoui
Elfrancisgis Daniel Durand, kaj Christian Bertin Kontrolis (ne)

Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.
Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO

Les Nids

FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE

Francio